

kvinpetalo



KVINPETALO Esperanto-Centro
15 rue du Lavoisier – FR 86410
Bouresse

☎ 33 (0) 549 03 43 14

informoj@kvinpetalo.org - <http://www.kvinpetalo.org>

ALIĜILO

Familia nomo : **Persona nomo** :

Virino Viro

Naskiĝdato :/...../..... **Nacieco** :

Adreso :

.....

Telefono : **Poŝtelefono** :

Retadreso :

Mi enskribiĝas en la staĝo de la **ĝis la**

Titolo de la staĝo :

Mi deziras trapasi la jenan ekzamenon

Utilaj informoj : tago kaj horo de la alveno (ĉu necesas, ke iu venu preni vin ĉe la stacidomo de Lussac les Châteaux), speciala dieto, ktp

Partopreno en la staĝoj supozigas aligon al la asocio :

Jam aliĝinta : **jes** **ne** Aliĝo : 12 € (jare civila jaro) Dumviva membro (120 €)

Tarifoj

Prezo de unu tago (vespermanĝo + tranoktado + matenmanĝo + tagmanĝo): 35 €
Luado de litotukoj (unufoja pago por tuta restado): 5 €
Duona tarifo por la infanoj de 4 ĝis 12 jaroj.
Por alveno antaŭ aŭ foriro post la staĝodatoj, informiĝu pri la eblecoj kaj tarifoj.

En
La

Subskribo
(por la neplenkreskuloj,
la subskribo de la gepatroj estas deviga)

Por validigi vian enskribiĝon, bonvolu sendi :

- Aliĝilon plenigitan, datumitan, subskribitan (po unu por ĉiu partoprenanto)
- Aliĝkotizon de 50 € (aŭ 70 € se temas pri muzika staĝo) por ĉiu partoprenanto (ne redonebla, okaze de malaliĝo)

FRUAJ ALIĜOJ : la staĝokosto reduktiĝas je 15 € okaze de enskribiĝo pli ol unu monaton antaŭ la komenco de la staĝo.

Pagu al kontonumero (IBAN) **FR91 2004 1010 0602 4086 2H02 795** ĉe Banque Postale, Limoges (banka kodo BIC **PSSTFRPPLIM**), je la nomo de **Société Yvonne Martinot**

PROGRAMO 2012

Aprilo 10a-13a: Praktikado de la lingvokaj historio de la Esperanto-movado, kun Miguel Ángel González Alfonso

Miguel Ángel González Alfonso estas Komisiito pri Lernado kaj Instruado de Esperanto en La Kuba Esperanto Asocio. Li kutime loĝas en Havano, kaj turneos tra Francio inter marto kaj aprilo 2012.

Aprilo 15a: Ĝenerala asembleo de SYM (asocio mastrumanta Kvinpetalon), je la 10a horo

Aprilo 16a-20a: Tradukado por spertuloj, kun Brian Moon

Tradukado ludas gravan rolon en Esperantujo, ĉu por riĉigi nian esperantlingvan kulturon, ĉu simple por sciigi pri okazaĵoj. Sed por bone traduki ne sufiĉas regi la koncernatajn lingvojn: necesas ankaŭ kono pri la priskribitaj aferoj kaj antaŭ ĉio ekzercado. Dum tiu ĉi staĝo ni do okupiĝos ne pri teorio sed pri praktiko: traduki tekstojn de diversaj specoj (ekz. literaturo, gazetaraj informoj, vikipediaj artikoloj) kaj analizi la aperantajn problemojn kaj eblojn. Temos esence pri tradukado el la franca al Esperanto, sed partoprenantoj kun aliaj gepatraj lingvoj estos bonvenaj, ĉar oni povos labori interalie pri tekstoj jam ekzistantaj en pli ol unu lingvo.

Aprilo 24a-28a: Preparado al la scienc-teĥnika branĉo de la Kapableco, kun Klaŭdo Roux kaj Vinko Markovo

Ekzistas kelkaj brilaj sciencpopularigaj verkoj en Esperanto kaj pluraj bonaj teĥnikaj libroj, sed tiu ĉi kampo restas malmulte flegata kompare kun beletro. Ĉi tiu staĝo estos okazo iom reekvilibrigi la situacion per studado de fakaj tekstoj en Esperanto kaj traduk-ekzercoj. Ne necesas mem esti diplomita fakulo por ĝui la staĝon. Sufiĉas iom da scivolemo pri tiuj temoj. Klaŭdo Roux estas emerita direktisto pri likenologia esplorado ĉe la franca centro pri scienca esplorado, kaj respondeca redaktoro de la scienc-teĥnika parto de la Nova PIV. Vinko Markovo estas doktoro pri biologio, studanta la evoluon de hormona kaj feromona komunikado en germania instituto pri fundamenta esplorado.

Majo 17a-20a: Edukado al interkultura komunikado, kun Kristin Tytgat

Estos prelego kaj ekzercoj pri interkultura komunikado.

Julio 20a-28a: Muzika Staĝo, kun Markov-familianoj

Dum tiu ĉi staĝo, esperanto estos pritraktita kadre de muziko, diversmaniere. Staĝgvidantoj proponos al la staĝantoj diskuttemojn rilataj al muziko. Ĉi jare, ĝenerala temo koncentriĝos ĉirkaŭ originalaj verkoj en esperanto: kiel statas la movado, kiel ĝi evoluas, kiaj perspektivoj? Originalaj verkoj en esperanto estos prilaboritaj, ne nur kantaj, sed ankaŭ instrumentaj. La staĝo finiĝos per koncerto, kie la staĝantoj prezentos la rezultojn de sia laboro antaŭ loka publiko. La enhavo de la staĝo povas evolui laŭ la personaj petoj kaj emoj de la staĝantoj. Ne necesas esti profesia muzikisto por partopreni. Ankaŭ lingva kurso por komencantoj estas antaŭvidita, paralele al diskutoj en Esperanto pri muzikaj temoj.

Julio 28a-Aŭgusto 4a: Praktikado de la lingvo (1a kaj 2a nivelo), kun Lala Ralalarisoa kaj Carlo Bourlot

Lala Ralalarisoa, el Malagasio, prizorgos la komencantojn, dum Karlo Bourlot, el Italio, gvidos lingvopraktikan kurson por progresantoj.

Oktobro 25a-28a: Praktikado de la lingvo per Tinĉjo-bildstrioj, kun Michel Dechy

Uzante, regule ekde kvin jaroj, la albumon Tinĉjo en Tibeto en siaj Esperanto-kursoj (2a nivelo), Michel kunigis tiun laboron en libra formo: « La bildstrioj kiel lernolibroj », aperinta en 2010. Michel montros al ni kiel utiligi tiun libron, ilustritan per bildoj el la verko de Hergé, plivalorigita per fotoj kaj situacioj ebligantaj trakti temojn kiel sporto, amaskomunikiloj aŭ niaj naciaj kaj regionaj festoj, por logi al Esperanto diversspecan publikon.

Novembro 1a-4a: Provludo de Interkant' pri Karmen', kun apartaj aliĝkondiĉoj.

Se vi interesiĝas pri tiu ĉi staĝo, kontaktiĝu rekte kun Manjo Clopeau, 12 rue de la Drisse, 56450 Theix, 02 97 68 98 57, <manjo.clopeau@wanadoo.fr>